

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

NOVIEMBRE

1 9 5 2

RUZAFÁ. 7

VALENCIA

(ESPAÑA)



SOMOS UNA MAGNIFICA REALIDAD

«Pienso, luego existo» dijo el filósofo. Y con ese aforismo expresó la idea de que el acto justifica al actor. Remedándole, podemos decir nosotros, los esperantistas: «Actuamos, luego progresamos!» Y, efectivamente, si no nos apartamos de los aforismos, y nos aplicamos aquel de: «Lo que no progresa muere», no podemos menos que estar satisfechos de nuestra capacidad de resistencia, consecuencia de una sana vitalidad, que hace posibles nuestros modestos pero efectivos triunfos. Victorias, y no pequeñas, son las que continua y progresivamente logra nuestra buena intención de que el idioma auxiliar sea aceptado por todos, como lógico y cumplido remedio al ya anacrónico caos lingüístico imperante en el mundo.

Si el esperantismo existe, después de sesenta y cinco años de vida y azares, es porque tiene sobrada razón de ser; y, como todos los movimientos humanitarios destinados al triunfo, nada pueden contra él los infortunados competidores, los pobres alegatos de los indocumentados y las burdas ironías de los oretinos.

Entre todos los argumentos favorables al Esperanto, el más convincente es el hecho escueto y simple de su efectiva realidad como lengua viva. He aquí, pues, el verdadero motivo de su éxito. El idioma creado por Zamenhof recibió de su genial creador el soplo anímico que lo lanzó al mundo, no como una concepción más o menos ingeniosa para servir de clave o báculo internacional, sino como un acervo espiritual perfecto, en lo que puede ser perfecta una creación del hombre, y apto para expresar todo lo bueno que pueda caber en el corazón humano. Con el Esperanto han comenzado los primeros balbuces de muchos niños. Por medio de él han sido posibles amistosas conversaciones entre gentes sencillas de muy diversas nacionalidades. Gracias a él han viajado, con una preciosa guía de comprensión, miles y miles de personas que sin él se hubiesen sentido extraños en países extranjeros. Y lo que es más convincente: por medio de este maravilloso lenguaje auxiliar, las gentes más heterogéneas, no sólo se han entendido, sino que se han estimado como si no hubiesen distancias entre sus hogares ni diferencias entre sus apreciaciones y preferencias o gustos personales.

Ese es el verdadero complemento del Esperanto; ese es el trofeo que nadie le podrá arrebatar, pues esas características tan señeras y tan sobresalientes son las que nunca pudo tener ninguno de los proyectos, anteriores o posteriores al Esperanto, y que nunca dejaron de ser proyectos... Si el nuestro es ya un idioma vivo, con su literatura, su historia y su pueblo jovial y animoso, todos los otros sistemas no han sido más que elucubraciones más o menos habilidosas, pero con todos los caracteres de un producto manufacturado en un laboratorio.

Sí, como se dice, somos pocos los que hablamos el Esperanto y pensamos como esperantistas, eso no significa que seamos despreciables. ¡Cuántas pequeñas nacionalidades existen en el mundo que tienen, a pesar de la escasez de sus componentes, un valor espiritual inestimable! Por ello, los esperantistas debemos estar orgullosos de nuestra ejecutoria, satisfechos de nuestra larga historia y confiados en el porvenir. Mientras los escépticos nos critiquen, nosotros debemos aprender y practicar; mientras los necios se burlan, nosotros debemos probar con hechos la verdad de nuestras afirmaciones. Así, mientras los «magister» discuten, si habló o no habló, demos nosotros con nuestros múltiples congresos anuales, la respuesta más adecuada y contundente a sus estratosféricas impugnaciones.

Y la paradoja es evidente. Nosotros, los idealistas, los utópicos y los románticos, desmentimos, con realizaciones prácticas y tangibles, a los llamados hombres prácticos y realistas, que siguen debatiéndose en el caos de la confusión y el balbuceo. Tan patente es la paradoja, que el gran público, esa enorme mayoría que siempre espera recibir las soluciones completamente resueltas, no podrá menos que ver y comprender la realidad de los hechos. Y cuando eso llegue, habrán de maravillarse todos de que haya durado tanto la sordera colectiva.

Per Esperanto, la varia spektaklo de la mondo estas pli interesa!

Oni ne forgesu, cetero, ke la Zamenhof-tago ankaŭ estas tago de la Esperanto-libro. Tial estas morala devo akiri almenaŭ malmultekostan libron. Memoru, ke por tiu celo funkcias

Libro-Servo de HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO - Herqán Cortés, 18 - Valencia

ĈIUSEMajNA ESPERANTO - ELSEENDO EN VALENCIA. RADIOSTACIO

Danke al efikaj demarŝoj de nia amiko M. Vidal; la Valencia radiostacio «Radio Alerta» disponigas ĉiusemajne 20 minutojn por Esperanto-elsendo sub ĝenerala titolo: **ESPERANTISTA MIKROFONO**. La programo estis inaŭgurata la 17^{an} de Oktobro, kaj de tiam oni regule dissendas ĝin ĉiumerkrede je la 23^h30 hispana horo. (22^h30 Greenwich).

La enhavo de tiuj elsendoj estas redaktata de s-anoj M. Vidal, A. Collado kaj J. Juan Forné, kiuj petas la kunlaboron de ĉiuj esperantistoj. Ĉiujn informojn, raportojn aŭ kontribuojn por la programo, oni devas sendi al jena adreso:

Sr. Jefe de Programación

RADIO ALERTA - Colón, 11 - VALENCIA

Ankaŭ estus danke akceptataj esperantaj diskaj, broŝuroj, prospektaj, gazetoj, k. t. p.; kiuj multe helpus la laboron de la redaktoroj. Ni ankoraŭ ne sciigas nun la legantojn pri la ondoj kaj metroj de la radiostacio, ĉar baldaŭ oni ŝanĝos la nunajn, pro enkonduko de kelkaj teknikaj plibonigoj; sed en la venonta numero, ni donos pli precizajn informojn. Dume, ĉiuj esperantistoj amase bonvolu skribi leteron aŭ poŝtkarton (hispanoj faru tion hispanlingve!) gratulante aŭ raportante pri aŭdebleco al la direktoro de tiu radiostacio, laŭ jena adreso:

RADIO ALERTA - Colón, 11 - VALENCIA

La fakto, ke tiu radiostacio estas ŝtata organizaĵo multe kontribuos al la daŭra plifirmigo de nia movado en Hispanio.

RADIO S. E. U. DE MADRIDO daŭre elsendas, kun kreskanta sukceso, sian interesan programon **ANTENO ESPERANTISTA** ĉiumerkrede je la 20^h30 hispana horo (19^h30 en Greenwich). La programo, kiel kutime, konsistas el raportoj, informoj kaj diversaj elektitaj pecoj el folkloro en Esperanto, kun hispanlingvaj klarigoj.

◆ ALIAJ ESPERANTO - ELSEENDOJ ◆

Radio Tarragona: la jaŭdojn je la 20 dum proksimuma daŭro de 15 minutoj.

Radio Manresa: la jaŭdojn je la 20^h15 kun tre interesa kaj varia programo.

La turismaj oficejoj el kin ajn lando, kaj la aŭskultantoj de Radio Roma, estas afable petataj havigi laŭ sia ebleco, al ni, donace, ĉaspecajn turismaĵojn presitajn en Esperanto; nome: gvidiloj, faldfolioj, prospektaj, afiŝoj, ilustritaj poŝtkartoj, kaj eĉ planoj; geografiaj kartoj, fotoj, k. t. p.

Per la ricevota materialo la Itala Turisma Oficejo ENIT arangos daŭran ekspozicion en la salonego vizitata de tutmondaj turistoj. Tial, tiu materialo ne povos esti resendata. Ni kvitanco la ricevon per bele ilustrita poŝtkarto kaj, laŭ disponebleco, per interesa analogaj materialo pri nia lando. Antaŭdankojn!

RADIO ROMA - Via V. Veneto, 56 - ROMA (Italio)

ESPERANTISTA VIVO GEEDZIĜOJ

Nia kara samideano Marco Aurelio Perles Sifre, instruisto en Mirafior (Alicante) edziĝis kun la simpatia fraŭlino Pepita Moncho.

Ankaŭ du estimataj ĝemikoj, Francisco Rodrigo Ferrando kaj Mercedes Tomás, el Valencio, ligis sin per la geedzaj ligiloj.

Al la du feliĉaj paroj, niajn gratulojn!

NEKROLOGO

Kun bedaŭro, ni sciigas la forpason de jenaj ĝesamideanoj:

José Efrén Pedraz Palacio, malnova esperantisto, protektanta membro.

José Sempere, modesta membro sed tre sindonema amiko de Esperanto en la Valencio lando.

Leonor Fernández Elizalde, edzino de nia fervora kunbatalanto en Santander, Urbano Gómez Collado.

Al la gefamilianoj ni esprimas nian plej sinceran kondolencon.

EN VISPÉRAS DE AÑO NUEVO hay que prepararse a cumplir con los deberes federativos y pagar la cuota correspondiente a 1953. Tenemos la satisfacción de anunciar que las tarifas para el año entrante *no sufren ningún aumento*, siguiendo las mismas, a saber:

Socio de número: 15 ptas — Socio abonado: 40 ptas. — Socio protector 75 ptas.

Pero para todos aquellos que quieran mostrar su aprobación a nuestro trabajo, están abiertas las listas de donativos. Téngase en cuenta que por mucho pan nunca es mal año...

LITERATURO

LA FRENEZULO

Fragmento el la originala novelo de Adolfo Augusto Nunes (Lisbono) gajninta la unuan premion por prozaĵ verkoj en la Literatura Konkurso.

Kompatinda numero 76^a) Lia romaneto estas tutsimpla intrigo, same kiel simpla estis, ekde lia infana aĝo, lia tre mizera vivo.

Manuelo (antaŭe li havis nomon, poste li havis numeron) estis ankoraŭ bubo, kiam lia patro mortis. Tial, la paĉjon li ne konis. Li estis ministro. Iam okazis subita diskrevo en ŝtonejo. Terura akcidento! Trafis lin la ŝtonpluvo, kiu forte flugis tra la aero. Oni portis lin hejmen kun la vizaĝo transformita, kun la ventro traborita de larĝa timegiga vundo. La akraj ŝtonpecoj morttranĉis la malfeliĉulon.

La orfo fariĝis plenkreskulo. Penige li prilaboris sian panon kaj la vivrimedojn por sia patrino, turmentplena virineto, kiun li tutkore amis. Li estis terkulturisto. Tage-nokte, per la ŝpato aŭ per la plugilo, li fosis kaj fendis por semado la grundon kupro-koloran de sia naskiĝlando. Ekster lia materia vivo, la panjo kaj la elektitino de lia koro estis lia sola mondo. La amatino aspektis kiel belstatura knabino; li tre estimis ŝin pro ŝia honesteco kaj boneco. Jam de longe li amis ŝin, kun natura inklino, kun ĉasta kaj serena amo. Iutage, la kazerno englutis lin. La stangstatura kamparano fariĝis disciplinita maŝino. Kelkajn monatojn poste, la milito forpelis la vilaĝanon en fremdan landon. Li batalis kurage antaŭ la malamika fronto. Li partoprenis en dekojn da plej sangaj kolizioj. Antaŭe, li semis tritikon el kies grajnoj oni faras la panon, kiu donas vivon. Poste —ho kruela ironio!— li vivis dissemante la morton. Kaŭzon li ne serĉis de tiaj eternaj kaj neutilaj luktoj.

Iam, mallonga letero sciigis lin; ke lia patrino ĉesis vivi. Tiu panjo, kiu amis lin varmege, ne transvivis la longan foreston de sia filo tre amata. Tiu aflikto kaj la manko de ĉio necesa mortigis ŝin... Korprema doloro preskaŭ frenezigis lin. Pasis tagoj. Alia korprema sciigo alvenis. Lia amatino kondukis tre mallojale. La perfidulino —oni tion asertis— foriris al Porto kun maljuna voluptema riĉulo. Legante la novaĵon, sufoka angoro paralizis lian koron. La malvirto kaj la perfido de la pekulino tiel afliktis lin, ke lia koro preskaŭ krevis. La altstatura, muskolforta kamparano fariĝis, iom post iom, malkuraĝa

LA GRANDA SURPRIZO DE S-RO GUSTAV ERIKSEN

Ĉiuj personoj kaj faktoj en ĉi tiu historieto estas absolute imagaj. Iu ajn simileco al realaj personoj aŭ faktoj estas nura hazardo.

Jes; li estas tre fervora esperantisto. Pri ĉi tiu ne povas esti dubo ĉe ies kapo. Li estas vere entuziasma, agema, diligenta samideano, ĉiurilate. Li apartenas al tiu speco de homoj, kiuj silente, konstante kaj obstine batalas ĉiel kaj tie por ideo, kiu estas al ili eĉ pli kara ol la propra vivo. Pro sia sufiĉe longa laboro, li jam estas «provita», «hardita», laŭ la profeta esprimo de «La Vojo». Post longa penado, li povis fondi Esperanto-Grupon en sia urbedo, kie nia afero estis tute nekonata, antaŭ ol li komencis propagandi ĝin. Dank' al sia obstina kaj trafa agado, dum du aŭ tri kursoj, li sukcesis arigi dekduon da novbakitajn samideanojn, ankoraŭ kelkfoje iom heziteme parolantaj —kelkfoje nur, ne malicig— kiu bone helpas lin en lia laboro, donante al li samtempe la certecon, ke li ne estas tute

izolita, kaj ke liaj klopodoj ne estis senfruktaj. Rafael Pérez estas lia nomo. Jes, certe vi ĉiuj lin konas. Li estas honesta, laborema viro. Honesta, jes, kvankam... li foje trompis krude alian samideanon. Verdire, mi ne scias, ĉu mi rajtas rakonti al vi la aferon, ĉar li ĝin diris al mi amike-sekrete. Sed, tial ke li estas, kiel supre dirite, nur imaga homo, mi ne timas, ke li kverelos pro mia perfido.

Do, mi rakontos al vi la okazintaĵon.

Hem!... Hem!... Nu, jen ĉio: Rafael Pérez legis fore en esperanta gazeto anoncon de iu Gustav Eriksen, el Kopenhago, petanta korespondantojn. «Mi nepre respondos!», oni povis legi en la teksto de tiu anonceto. Rafael, nia amiko, tuj skribis al la koncerna adreso dirante, ke li deziras korespondi kun la anoncinto, ĉar tiu norda lando multe allogas

kaj cerbomalsana. Daŭre li restis silentema kaj enpenso. Liaj helaj okuloj de montarano iĝis glaciaj kun senesprima kvieteco. Li ŝajnis vivi en la regno de nehoma muteco.

Iun vesperon ektondris la kanonoj. Surdiga bombardado aŭdiĝis kun sama bruego sur la tero, kiel dum terura tertremo. Li postenis ĉe la unuaj vicoj. Amasiĝis kadavroj ĉirkaŭ li, kun plumbkoloraj vangoj kaj profundaj vundoj. Varma sango fluis fumigante. La vunditoj luktis diable, elmontrante siajn difektitajn junajn korpojn. La kampo kovrita de kadavroj estis saturita de haladzo, ŝvito, sango, polvo kaj putraĵoj.

La nokto envolvis la teron per sia stelplena nigra vualo. Tie kaj ĉi tie, la kugloj sibilis, la pafado krakegis, nur interrompita de timegigaj intervaloj. Dum la tuta nokto, la batalo daŭris. Kun besta obstino, eĉ pli krude kaj sovaĝe ol ĝis nun, aŭtomate li pafadis, ĝis fine li falis vizaĝen sur la koton. Matene, ĉe la krepusko, oni vidis lin surventre, kun la longa korpo en rigida senmoveco, kvankam ankoraŭ la kuntiritaj manoj prementis forte la pafilon. Oni levis de la tero la soldaton. Li ne estis vundita, sed liaj membroj restis senmovaj, lia vizaĝo kun kadavra paleco, liaj okuloj kun eksterordinara nesangemo.

Oni alparolis lin. Sed li nur ekridetis senkonscie, eligante obtuzajn sonojn kaj tute nekompreneblajn murmurojn... La doloro idiotigis la kompatindulon.

Tiel li restis longtempe: en la korpo, preskaŭ kompleta senmoveco; en la spirito, plej profunda atonio. Iom post iom, li reakiris la fizikajn fortojn; sed la mensaj kaj moralaj kapabloj apenaŭ duone rekonsciigis. Li revenis en la patrujon, kaj la kompatindulo vivaĉas nun en la ĉefurbo. Li estas vendisto de maldecaj literaturaĵoj kaj de logaj flugfolioj, kiuj anoncas kaj reklamas divenistojn de bonŝanco. Kutime li vagadas de drinkejo al drinkejo. Ofte li ebriiĝas. Tiukaze, li ruliĝas teren en konvulsiaj spasmoj de momenta furiozeco.



La procesio ade pasis. Oni aŭdis la hufbatojn de l'ĉevaloj. Rebrilis en la aero la bajonetoj de l'soldatoj. Estis glora apoteozo al la mortintaj nekonataj soldatoj...

En la aero ŝvebas vibrado de freneza entuziasmo. Ankoraŭ interpuŝigante, la popolo svarmas sur la stratoj. Kaj tumulte kaj dense pleniĝas la larĝaj trotuaroj.

lin, kaj li multe ŝatas koni ĝisfunde ĉiajn aferojn rilatajn al Danlando. Post kelkaj ne multaj tagoj, li ricevis ĝojigan respondon: Jes, tre volonte mi korespondos kun vi. Demandu al mi, kion vi volos. Mi parolos al vi pri mia lando, longe kaj detale, respondante viajn demandojn... ktp. ktp.» Rafael sendis tiu novan leteron, gajan leteron, riĉan je demandoj. Pasis tri monatoj, kvar monatoj, kvin monatoj... Ho, ve, li ne ricevis respondon; koverto kun la deziregata respondo ne venis.

Tamen, parenteze parolante, Rafael estas bonŝanculo; li povis partopreni en la Universala Kongreso, okazinta en Oslo. Reveninte de tie, Rafael restis en Kopenhago tutan tagon. Subite, li memoris pri sia nekonata korespondanto; kaj sep minutojn poste, li frapis aroge ĉe la pordo de iu kopenhaga domo:

—Ĉu Gustav Eriksen? Jes, sinjoro, eniruj

Kaj nun, kara leganto, bonvolu pardoni se la fortikaj manoj de Rafael Pérez ankaŭ skuis vin, pro simila kaŭzo. Tiukaze, neniel mi estas kulpa.

—Mi estas Rafael Pérez, el Hispanio. Eble, vi memoros, ke iam mi skribis al vi respondante al via anonceto. Vi akceptis min kiel korespondanton, Mi ree skribis al vi kaj...

—Ho, ĉu vere? Kial vi troviĝas nun ĉi tie?

—Tre facile. Jam de longe mi atendas vian respondon tie, en mia hispana anguleto. Sed mia pacienco elĉerpiĝis, ĉu vi komprenas?—daŭrigis Rafael per voĉo pli kaj pli laŭta— kaj mi venis el mia lando NUR por diri al vi jenon: Kial —kaj en tiu momento, preninte sinjoron Gustav Eriksen per ambaŭ manoj, ĉe la ŝultroj, Rafael forte skuis lin— kial vi ne respondis al mi? Kial do? Stultulo!!

Kaj, tuj post tio, Rafael rapide foriris, dum Gustav Eriksen, mirigita, falis sur sian komfortan seĝon, kie li restis dum kvar aŭ kvin horoj ne sciante, ĉu li sonĝis aŭ ĉu la demono, kun verda steleto, volis primoki lin...

Saluto al la XIII^o Hispana Kongreso de Esperanto en Valencio

Mi ne trovas ŝancon. Zorgegoj ne favoras iri al Valencio kun flam' kaj pasi'. La mastrino lerta estas en malsano; kaj, sen ŝia brako, kion tornus mi? Tamen, oni en domo de Tarraso kruta, kune kun hejmanoj, diras, man' sur kor', ke ni rememoros tagojn de feliĉo; tagojn de fidelo; tagojn en honor' inter kamaradoj de diversaj urboj, de diversaj landoj, en fratiga varm', murmurante lingvon de veluraj frazoj, lingvon de heredo de plej granda ĉarm'. Floras la Kongreso de dektria suno; kaj ni, pacamantoj, sin ofertas nun al la bela urbo de l'orangoj freŝaj, de pentraĵoj fortaj, kaj de hela sun'. Estas ĝi la nesto de Federacio, kiu ja nin protektas en persista vol'. La Bulteno kara, eta kaj profunda, dank' al la koboldoj, ŝirmas en konsol' de pedantaj mokoĵoj de teruraj viroj, kiuj sin perfortas ĉe komercinfer', dum ekzistas ilo de facila kredo inter homoj noblaj de malgaja Ter'. Ni, de nia domo kun modesta sojlo, sentas nostalgion de la babilad' en muzikaj pecoj, tra la stratoj plenaj de la riĉa urbo de moŝt' Ausias March.* Por esprimi dankon, kaj esprimi ĝojon, falas sur la paĝon perlo de l'edzin. Filoj kun respekto tuŝas la paperon, kaj la vortoj kreskas kaj tremigas min. Nun, tra la fenestro de karcera hejmo, glatas ia formo de la gard-angel' kun rubando verda kaj lumiga stelo, kaj ni reve-reve glugas al la cel'.

VALENTIN ALAVEDRA (Tarrasa)
Prezidiinto de la pasintjara XII^a Hispana Kongreso de Esperanto

* (elp. Mark) famiĝinta nomo de klasika plej elstara poeto de la valencia (kataluna) lingvo, en la mezepoko.

INTER LA PROZO

Al ĉiuj bonaj geamikoj, kiuj kutime legas miajn kroniketojn, certe ŝokis la abrupta fino en la revuado de la pasinta numero. Jes, pro manko de spaco, por antaŭen daŭri sur la paĝoj de nia Bulteno, mi devis atendi en aero, pendante de nevidebla paraŝuto, super Aŭstralio, la vastega insulo-kontinento, kiu, pro sin geografio, fakte estas aparta mondo en nia mondo.

Komprenu, do, ke urĝas ligi la fadenojn por sekvi la rakonton, neniel perdante tempon en vanaj akcesoraj akrobataĵoj:

LA RONDO, ĉiam en stato de sana optimismo, deĵoras sen emo al laciĝo, kiel oficiala organo de la aŭstralia asocio, kiu en jaus sendita depeŝo anoncas la viziton al nia lando de tiea samideano. La hispanaj grupoj multe ĝojos, aŭdante lin persone; pri tio ne ekzistas dubo. Intertempe, speciala plezuro estas la legado de tiu malproksima gazeto, kiu aspektas kiel bela albumo pro la varia kaj ege interesa materialo, tra dense provizitaj paĝoj. Post la transoceana *ekskurso*, jen denove min envolvvas tre karaj kolegoj, kiuj per konataj nomoj atestas pri la forto de Esperanto tra la politika mozaiko de Eŭropo, centro ankoraŭ de klasikismo ESPERANTO, la serioza organo de U. E. A. ĉiam akurate aperinta, estas kompilo de plej interesaj aktualajoj kun taŭgaj informoj kaj distra materialo. Tre agrabla estas la raporto pri nia pasinta kongreso, lerte verkita de svisa amiko, S-ro R. Zollinger. Alia artikolo, «Reformado de la japana skribsistemo» estas instrua kaj vere leginda. Bele enkadrigita, aperas la traduko de paroladeto kun S-ro Trygve Lie, kiu, demandite pri la utilo de Esperanto, respondis: «Ke li persone favoras ĝin, ne nur kiel Ĝenerala Sekretario de la Unuigitaj Nacioj, sed ankaŭ kiel norvego». Estas interese noti, ke D-ro Breth, aŭtoro de la intervjuo, jam antaŭ ĝia publikigo, submetis ĝin al S-ro Trygve Lie, kiu aprobis ĝin kaj permesis ĝian publikigon. THE BRITISH ESPERANTIST, la respektinda kolego, ankaŭ estas fidinda mentoro pri korekta kaj ĝusta apliko de la lingvo, inter lerta distribuo de la tekstoj, ĉar najbare de sprita verseto de R. Rossetti troviĝas la bonega artikolo: «Esperanto kiel hejmi-

BELARTA KONKURSO DE U. E. A. 1953

◆ La Literatura Sekcio de U. E. A. aranĝas por venontjara somero, dum la 38^a Universala Kongreso, Belartan Konkurson, kies branĉoj estos:

- a) Originala poezio; b) Tradukita poezio;
- c) Originala prozo; ĉ) Originala drameto.

Legu detalajn klarigojn en novembro numero de «Esperanto» aŭ petu aliajn pli konkretajn sciigojn (sendante respondokuponon) al la Sekretario:

RETO ROSSETTI

39, Willows Crescent - BIRMINGHAM 12 (Anglio)

DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

lingvo» tiel klare kaj detale verkita, ke mi influos por represo, ĉar esperantistaj gepatroj tiros el ĝi multan profiton. **ESPERANTO EN SKOTLANDO** estas io pli ol simpla bulteno, ĉiu numero estas valora kajero pri literaturo, laŭ plej subtilaj nuancoj de la skota skolo. Ĉiu amiko de la esperanta beletro nepre devas rilati kun ĉi tiu simpatia gazeto, en kiu eĉ la recenzoj estas perloj tre puraj. En la ekzemplero, kiun nun mi legas, estas frontpaĝa artikolo de la konata stilisto W. Auld pri la skota lingvo. **THE WORKER ESPERANTIST** estas modelo de serioza enhavo kun agrabla aranĝo; tre objekte estas pridiskutataj tiklaj aktualajoj; kaj ankaŭ tre skrupule oni recenzas la novajn librojn, laŭ la morala aŭtoritato de vasta kompetenteco kaj honestaj mondkonceptoj. **SKOLTA MONDO**, ĉiam vigla, ĉiam preta kaj freŝa gazeto, reprezentas en nia movado la noblajn aspirojn vivi en pli intimaj rilatoj kun la naturo, akorde kun la altaj celoj de la skoltismo. Kvankam faka informilo, ĝi estas blovo de pura aero, kiu gaje ventolas la paĝojn kaj foliojn de nia tuta gazetaro. **UNIVERSAL LEAGUE**, kiel filio de Universala Ligo en la brita teritorio, estas kuraĝa folio por defendi, preskaŭ nur en angla lingvo, la principojn por federacia mondregado. Najbare al tiu temo oportune situas **SVISA ESPERO**; impona kaj belega bildo de Berno, la svisa ĉefurbo, laŭte proklamas kiel logaj punktoj troviĝas en la mondo. Kaj pri tio, la svisa lando estas unuaranga muzeo; en sia plaĉe eldonita gazeto, la tieaj amikoj zorgas pri plej diversaj aspektoj de nia movado. Ampleksa spaco estas por la utila rubriko «Lingvaj Problemoj» kun detalaj klarigoj pri la fonetiko. Ankaŭ en ĉi tiu numero S-ro Zollinger rakontas pri nia Kongreso. **NEDERLANDA ESPERANTISTO** informas pri nova redaktoreco, sub la zorgo de D-ro F. Roose, kiun mi salutas plej bondezire. Pri la rezigno de S-ro Kalma, dankinda eksredaktoro, oni diras jenajn sukoplenajn vortojn: «La plimulto de nia legantaro tute ne pripensas kiom da peno donas la redakcia tasko: verki artikolojn, korekti aŭ reverki la kontribuojn de aliaj,

kalkuli kiom da linioj povas kaj devas ankoraŭ enhavi la numero, amputacii artikolojn por ke ili donu la ĝustan mezuron, respondi leterojn —kelkfoje kolerajn— pri la enhavo de iuj artikoloj, aŭ plendojn pri *kripligo* de originala teksto aŭ pri la neakcepto de iu *valora* kontribuajo, korektado de la kompostajo, ŝvitado, telefonado kaj telegrafado se iu regula (?) kunlaboranto ne sendas ĝustatempe; kaj... eĉ de tempo al tempo la legado de leteroj de legantoj, kiuj esprimas kontentecan». Eĉ en la malproksimo de mia izolejo, mi scias ja pri la plena vero de tiaj asertoj. Tamen, en ĉiu ofero ne ĉio estas sufero... **LA JUNA VIVO**, kvazaŭ infano kun novaj ŝuoj, aperas gajmiene kiel organo de la nova junular-organizo, kio rezultis el la reorganizado kaj nomŝanĝigo de la antaŭa, al kiu mankis la vorto Esperanto. La nova estraro, konsistanta nur el aŭtentikaj gejunuloj, intencas iniciati vastan kampanjon inter la vicoj de la junularo; tial, la gazeto «nepre devas esti redaktata de junaj personoj, kiuj staras en la vivo kaj kiuj precize scias, kiel la hodiaŭa junularo pensas, agas kaj reagis». Kompreneble, en mia neĵuna brusto flamas deziroj pri plena sukceso al la vigla heroldo de la juna generacio esperantista, en ĝia nova etapo. **LA PROGRESANTO** posedas la arton simpligi la malsimplajn problemojn, kiuj ĝenas ne jam la lernantojn, sed ankaŭ la progresantojn. Plej mirinde, la redaktoroj, kvazaŭ divenante la pensojn, solvas multajn demandojn eĉ antaŭ ol ili konkretiĝas. Plaĉa kaj instrua estas la klarigado de esprimoj, el la grekaj mitologio kaj literaturo, por la okazo de ekzemploj kaj aludoj en verkoj. Estus bone, ke simila folio aperus en aliaj landoj. Bedaŭrinde, la emo ellerni, kiam oni lernis... aŭ nur oni eklernis, ne tre multe abundas; kvankam la plezuro poluri la akiritan scion logas la elektitojn per pli kaj pli da subtilaj ĉarmajoj, dum daŭro de la tuta homa vivo, eĉ konsciante, ke neniam oni sufiĉe lernos...

Tamen, sufiĉe jam se oni lernas, ke ĉio taŭgas por lerni; laŭ tio, la vasta scenejo de la mondo fariĝos lernejo, kie la eternaj strebantoj ĉiam estos aŭtoroj de paĝoj plej decidaj en la historio. Jen ja la opinio de

FRĔNEZIGA RAKONTO

Foje, viro estis kondukata antaŭ juĝisto laŭ plendo de sinjorino, ke li vangofrapis ŝin. La juĝisto demandis, por klarigi la aferon, ke li diru la kaŭzon de sia ago. Kaj la viro tute trankvile tiel parolis:

—Ni ambaŭ veturis en duetaĝa aŭto-buso. La sinjorino sidis apud mi. Vidinte, ke la enspezisto alproksimiĝas, ŝi malfermis sian sakon, tiris el ĝi monujon, fermis la sakon, malfermis la monujon, prenis monerojn, fermis la monujon, malfermis la sakon, metis la monujon kaj fermis la sakon.

Sed, tial ke la enspezisto preterpasis al la supra etaĝo, la sinjorino malfermis la sakon, tiris el ĝi monujon, fermis la sakon, malfermis la monujon, enŝovis la monerojn, fermis la monujon, malfermis la sakon, metis la monujon kaj fermis la sakon.

Tamen, la enspezisto jam revenis mal-supren, kaj tiam la sinjorino malfermis la sakon, tiris el ĝi monujon, fermis la sakon, malfermis...

—Ho, sufiĉe! Vi frenezigas min! —tiam kriis kolere la juĝisto.

—Tio same ĝuste okazis al mi kun la sinjorino! —respondis la akuzito.

VILHELMINA BOSCH.

MALBONSORTA EDZO

Sinjoro Klem babilas kun amikoj:

—Jes, vere mi estas tre malbonsorta kompare kun mia edzino. Antaŭ unu semajno, ŝi trovis dum mia foresto altvaloran braceleton, kiu vere mirinde kaj tute hazarde adaptiĝas al ŝia mezuro.

Pasintan semajnon, ŝi gajnis en loterio belegan pelton, ankaŭ plene laŭmezure. Tamen, reveninte de mia vojaĝo, mi trovis sub la lito pantoflojn, kiuj estis tro grandaj!

EMILIO PRADES.

KONCIZECO

—Paĉjo, mi deziras amuziĝi hodiaŭ vespere kaj trinki glason da biero.

—Faru, kion vi ne povas lasi!

—Jes, paĉjo, sed mi ne havas monon.

—Lasu, kion vi ne povas fari!

D-ro A. H. (Aŭstrio)

SFINKSA ANGULETO

MATEMATIKA EKZERCO

Ekzistas kvanto kun tri ciferoj, kiu prezentas tri jenajn kuriozajn kombinojn:

La sumo de la du unuaj ciferoj egalas la trian. La sumo de la unua kaj la tria estas duoblo de la dua. La numero de la du unuaj estas kvaroblo de la tria.

KIA, DO, ESTAS LA KVANTO?

Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 20. Decembro

SOLVO DE LA MISTERAJ KARTETOJ
EN LA PASINTA NUMERO

TRI - BU - NO TRI - BU - TO

Disĉiplo demandis al Sokrato, kio estas pli konvene: edziĝi aŭ resti fraŭlo.

La respondo estis jena:

Ambaŭ situacioj ĝenas!

UNU BILIONO

